



LA  
HELA  
HIRUNDO

## BULTENO ESPERANTA GRUPO

Ateneu Santcugatenc - Pl. Pep Ventura 1 - Sant Cugat del Vallès

Nº 11 AGOSTO SEPTIEMBRE 1990

LA



LINGVO

DE LA

HOMARO





BULTENO DE LA ESPERANTA  
GRUPO "Jozefo Anglés"

Nia adreso:

Grup d'Esperanto 'Jozefo anglés'  
Pl. Pep Ventura - 1 - C. 08190  
aŭ Poŝ'kesto. 336 t. 674 61 80

Prezidantino:  
TRINITAT GARCIA

Vicprezidanto:  
JOAN SUTRIAS

Sekretario:  
JOSE MANUEL CONDE

Vicsekretario:  
ADAMO SANCHEZ

Kasisto:  
JOSEP CASTAÑE

Gekunlaborantoj:  
ALICIA SMITH  
GLORIA CORRONS  
KARLQ ANGLÉS  
JAUME DELTELL



ENHAVO

- Jubilea Hispana Kongreso
- Opinio de S-ro Wylleman R.
- La karaktero de niaj kongresoj
- La lingvo de Britio
- Unueco estas sukceso
- Muzik paĝoj
- Intervjuo
- Demandoj
- Omaĝo al S-ro Petro Núez
- Opinio de S-ro Amador Díaz
- Leterpeco de S-ro Aŭrelío Solís Pi
- Letero de la HEF-Prezidanto
- Spritaĵoj
- Lastaj novaĵoj

PRI LA ENHAVO DE LA ARTIKOLOJ  
RESPONDECAS LA AUTOROJ MEM.



# JUBILEA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN SANT CUGAT DEL VALLÈS

Sant Cugat del Vallès havis la honoron esti sidejo de la Jubilea 50-a Hispana Kongreso de Esperanto en ĉi jaro 1990.

De la 11a ĝis la 16a Julio kunsidis en nia urbo ĉirkaŭ ducent esperantistoj, venintaj el ĉiuj regionoj de nia lando. En komfortaj instalaĵoj de la Centro, disvolviĝis Kongreso, en kiu oni pritraktis la marŝon de nia Federacio, la atingojn kaj la projekton de la nova Estraro por la estonteco de Esperanto en nia lando.

Kiel tradicie, la unuan tagon, 11an Julio, oni disdonis la dokumentojn al la alvenantoj. Dum la tuta mateno aŭdiĝis salutoj, renkontiĝis amikoj, kaj la membroj de la LKK aktive laboradis por distribui la kongresanojn en la lumaj kaj ampleksaj ĉambroj de la restadejo.

Sekvantan tagon, 12-an, okazis la solena malfermo de la Kongreso. En la granda salono de la Centro, bele ornamita, kunsidis la Kongresanoj. Sub prezido de la Estraro kaj kun ĉeesto de Sro. Urbestro de Sant Cugat, ni aŭskultis saluton de nia eksprezidanto Sro. Aragay, bonvenigon —en Esperanto— de la Sro. Urbestro Joan Aimerich kaj de la Prezidantino de LKK, Ili ĉiuj ricevis fortan aplaŭdon.



Paroladis poste katalunlingve kaj en esperanto Sro. Antonio Alonso pri la marŝo de la federacio kaj la planoj por estonta esperantista agado en la universitata kampo.

Kiel ĉiujare, reprezentantoj de diversaj grupoj naciaj kaj eksterlandaj salutis la kongresanojn kaj deziris bonsukceson al la Kongreso.

Postagmeze ni vizitis muzeon en Sabadell, kaj ankaŭ la imponan monumenton al Esperanto, kiun antaŭ ne multe oni inaŭguris.

Vespere, Sro. Frank Buckley prelegis pri la temo "sesdek Jaroj de Esperantista Vivo". Vigla kaj interesa priskribo de lia vivo, verbe kaj bonhumore rakontita.

Plej grava estis la parolado de Sro. Alonso pri "Esperanta Konjugacio". La ĉeestantoj atente sekvis la vortojn de nia Prezidanto. La pritrakto de la temo estis altnivela kaj klare disvolviĝis antaŭ la partoprenantoj.



Dum la tago 13a. ni ekskursis al la historia Monaĥejo de Poblet kaj bankedo restos por ĉiam tre agrable en nia memoro.

Gitaran koncerton ni ĝuis vespere, kaj dankis per forta aplaŭdado, Samideanon Joan Rafols.

Sabaton, 14-an Julio, kunsidis la Estraro de HEF kaj ankaŭ diversaj fakaj sekcioj. Interesan prelegon pri Leon'Tolstoj ni aŭskultis. Prezidanto Sro. Alonso paroladis pri Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto, kiujn oni preparas. Okazis la Ĝenerala, Ordinara kaj eksterordinara kunvenoj de HEF. Ĉefa temo, la nova HEF-statuto. La aprobitaj ŝanĝoj sendube havos favoran rezultaton en la marŝo de la Federacio.

Dimanĉe, Pastro Casanoves celebris Meson en Esperanto, kiun partoprenis multaj esperantistoj.

En solena kunsido oni rememoris la figurojn de du elstaraj forpasintaj esperantistoj: Sroj. Petro Núez kaj Sro. Ramón Fernández. Pri ili ambaŭ parolis emociige kaj elokvente Sro. Giordano Moya. Poste, oni prezentis du metodojn de esperanto kaj la lastan libron de Sro. Moya "Esperanto en Prospektivo", kiu vekigis grandan intereson inter la aŭskultantoj.

Prelego de Miguel Fernández pri la poezio de Garcia Lorca, kun belegaj kantaj ilustraĵoj fare de la parolanto, vere ravis la aŭskultantojn kaj meritis tondran aplaŭdodon.

Kaj vespere okazis la oficiala fermo de la Kongreso. Dankparolis Sro. Alonso kaj ni adiaŭis ĝis la venonta jaro.


La premio "Klara Silverník" estis ĉi-jare aljugita al Srno. Matilde de la Fuente, edzino de nia samideano Enrique Piquero, UEA-delegito en Zaragozo.

Lundon, deksekan de Julio. la kongresintoj ekskursis al Barcelono kaj vizitis la konstrulaboron por la venontaj Olimpikaj Ludoj.

Dum la semajno okazis ankaŭ kunsidoj, ekzamenoj, ktp.

Malmultvorte, ni ĝuis glatan, infesan Kongreson, bone organizitan, kie laboro kaj ripozo unuiĝis en justa mezuro. La restadejo estis, kiel dirite, digna kaj tre komforta. Neforgeseblaj estos la amikaj babiladoj en la grandaj kortoj de Centro Borja, sub la ombro de imponaj, belaj arboj plenaj birdoj. Tre bone laboro de la LKK, kiu meritas dankojn de la tutaj esperantistaj gastoj.

Jozefo.



esperanto  
ternationale taal



ESPERANTO  
internacia lingvo

WYLLIAM RAYMOND

A. Vermeylenstraat 65

B-8400 OOSTENDE

*Belgio*

Kiel eksterlandano mi aparte interesiĝis pri la ASKH-programeroj. Mi do volonte raportas pri la belaj momentoj, kiuj cetere iris krescende al belegaĵo.

Kvankam mi vane klopodis distingi la verajn esperantistajn elementojn en la prelego de s-ano Frank Buckley "Sesdek jaroj da esperantista vivo", ĝi tamen tre amuzis min, dum ĝi krome pruvis ke Esperanto esta tute taŭga por reprodukti la veran britan humuron.

La vizito de la fama monaĥejo Poblet tre interesis min. La tagmanĝo en "La ŝlosilo" okazis en preskaŭ familia etoso kaj konatigis al ni la voĉajn talentojn de du geĉeestintoj.

Pri la vizito de la Esperanto-muzeo de Sant Pau d'Ordal mi havas apartan memorigaĵon. Eldirinte al la prizorganto, s-ro Hernández i Yzal, mian admiron pri lia laboro, mi promesis lin la alsendon de nia klubbulteno. —"Momento. Venu kun mi", kaj li antaŭiris al la laborĉambro. Li eksidis antaŭ komputilo kaj tuj aperis sur la ekranon ĉiuj donitaĵoj pri "La Konko" en ok punktoj. Subite la cirkaŭanta temperaturo de la somera postagmezo estis malpli ol la varmego de mia koro. Imagu! En tiu sunplena hispana urbeto mi retrovis videblan ligilon kun mia grupo en Oostende! Cetere, ne la teknika mirindaĵo tiom trafis min, sed ja la rezulto de la esperantista retaĵo.

La apogeon tamen alportis al mi la prelego pri Federico Garcia Lorca, fare de s-ano Miguel Fernández Martín. La preleganto restos en mia memoro ne nur kiel la Esperanto-tradukinto de Garcia Lorca, sed kiel la plena artisto kiu per sia klara prelegado, siaj kortusaj deklamado kaj kantado (!) malkaŝis por mi la varman, abunde senteman hispanan karakteron. Ĉu mi bone komprenis ĝin? Mi neniam vizitis Hispanion dum la antaŭa politika reĝimo. Se tiu mia sinteno estas komprenebla por demokrato, nun mi tamen bedaŭras la perditajn jarojn. Pro tio mi estas tiel feliĉa ke mi povis renkonti tian remarkindan artiston en la persono de s-ano Martín.

Post la duontaga ekskurso al Barcelono, la kunvenejo malpleniĝis. S-ino Garcia, la prezidantino, estis unu el la lastaj kiujn ni adiaŭis. Kiel ŝipestro ŝi gvidis la kongreson: la unua kaj la lasta surloke. Aparte mi dankas ŝin kaj ŝian junan helpinton, José Manuel, por la ebleco kampadi sub la pinoj en la parko. Mia danko ankaŭ iras al la respondeculo de Centro Borja, s-ro Michael Rosique, kiu helpis por nia tuta komforto.

## LA KARAKTERO DE NIAJ KONGRESOJ

---

Zamenhof diris pri niaj kongresoj: "Ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan. Esperantistoj, disigitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ..." (El parolado en St. Petersburg, 1910).

Ĉeestante niajn naciajn Esperanto-kongresojn oni aŭdas kelkajn plendojn pri troaj distraĵoj kaj la konstanta nacilingva babilado. Pri tio ni povas ankaŭ diri, ke krom la esperantistoj, kiuj ellernis la lingvon ankaŭ ĉeestas la kongresojn simpatiantoj, familianoj kaj geedzoj, sciante Esperanton nur unu el la geparoj. Ankaŭ oni devas konstati, ke ne ĉiu esperantisto reĝas sufiĉe la lingvon por ĝin flue paroli kiel la gepatran. Se nur ĉeestus la kongresojn tiuj, kiuj ellernis la lingvon, ili estus malmultaj kaj tiu, ĉu estus pli bone aŭ des malpli bone? Tio grava estas multaj ĉeestantoj plene posedantaj la lingvon, al tio oni devas klopodi, sed dume, kion fari? Strebi por altigi la nivelon de la lingvoscio. Tamen oni devas kompreni la funkcion de la nuntempaj kongresoj: Unue, ni ankoraŭ ne estas homamasoj kaj loĝas disigitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kaj la kongresoj estas la okazaĵo por persone nin interilatiĝi. Due, la kongresoj estas eventoj por propagandi Esperanton ekster niaj medioj kaj ankaŭ en la oficialaj instancoj.

La politikistoj faras mitingojn, ni laŭ kutimo ne faras ilin, kaj pro manko de ekstera vivo ni tre izoliĝas de la ĝenerala publiko, nur dum niaj kongresoj fakte propagandas Esperanton por veki vastan atenton. Se niaj kongresoj ne estus multnombraj, ni pli izoliĝus kaj restus pli ignorataj.

Fakte, ni povas konsideri niajn kongresojn kiel nian ĉiujaran plej grandan feston, similan al la ĉiujaraj someraj plej grandaj festoj, kiujn kutime faras ĉie, de la plej malgrandaj vilaĝoj ĝis la plej grandaj urboj. Ĝi estas la plej granda festo, kiu kunvenigas parencojn kaj amikojn. La ripoz-festo post la senhalta laborado de la tuta jaro kaj paŭzo por entrepreni la laboron ĝis la venonta somero.

En nia pasinta kongreso en Sant Cugat del Valles okazis interesaj kaj gravegaj paroladoj pri scienco, poezio kaj esperanta gramatiko. Ankaŭ okazis omago al forpasintaj esperantistoj, artaj vesperoj kaj instruaj ekskursoj, kaj super ĉio ĉi, frateca kunvivado, kaj en la kongreso kaj en la komuna loĝado.

La sukceso de la 50a. Hispana Esperanto-kongreso en Sant Cugat del Valles estis plena.

Giordano Moya.

## LA LINGVO DE BRITIO

---

Se oni demandas kiun lingvon oni parolas en Britio, sen iu ajn dubo la respondo estas: la angla. Tio estas vero, ĉiu enloĝanto en la brita insularo komprenas la anglan; eble en iu vilaĝeto aŭ malgranda insulo en la nor-okcidento unu aŭ du homoj parolas nur unu el la lingvoj menciitaj ĉi tie, sed tiuj homoj certe ne abundas nek estas junaj. Do, kiuj estas la lingvoj, krom la angla, parolataj en Britio?

La plej grava el tiuj aliaj lingvoj estas la kimra, uzata en partoj de Kimrio, aŭ Kimrujo (Pais de Gales), ĉefe en la okcidenta parto. Oni diras ke 250.000 homoj parolas ĝin, sed estas duboj ke ĉiu el ĉi tiu nombro uzas ĝin kiel la unua lingvo en la hejmaj kaj najbaraj rilatoj, ĉar ili ankaŭ scipovas la anglan kaj preskaŭ certe ili uzas tiun lingvon en la laborejoj, almenaŭ se ili ne estas terkulturistoj. En la lastaj 30 jaroj la lingvo iomete reviviĝis, ĉefe ĉar nun, en multaj partoj de Kimrio, infanoj povas esti instruataj en lernejoj uzante la kimran kiel la unua lingvo, kaj la anglan kiel aldonan dua lingvo. Ankaŭ jam de antaŭ pluraj jaroj estas televidaj elsendoj en la kimra. Ĉi tiu lingvo, same kiel la aliaj menciitaj ĉi tie, estas keltida, dum la angla, je la komenco estis saksonida, kaj post la invado de la normandoj en 1066 ĝi akiris multajn vortojn kaj gramatikajn formojn el la tiama franca lingvo.

En Skotlando troviĝas la gaela lingvo, ankaŭ keltida, ankoraŭ parolata en la nord-okcidenta marbordo de la lando kaj en la Hebridaj Insuloj. La nombro de parolantoj estas eble 10.000 homoj, tamen iuj asertas ke la nombro estas pli ol 20.000. En Skotlando oni ankaŭ parolas, ĉefe en la norda duono de la lando, la nomata skotan lingvon, kiu estas dialekto de la angla. En tiu lingvo verkis la poeto Robert Burns (1759–1796) pluraj el kies poemoj estas tradukitaj en la Esperantan.


En la insulo Man, kiu troviĝas inter Granda Britio kaj Irlando, iuj loĝantoj parolas la manksan, denove keltida lingvo. Optimistoj diras ke estas almenaŭ 2.000 parolantoj de la lingvo, sed lingvistoj dubas pri ĉi tiu nombro. La kvara, ankaŭ keltida, lingvo, estas la kornvala. Ĝi vere mortis je la komenco de la lasta jarcento sed entuziasmoj pri la kornvalaj tradicioj revivigas ĝin, jam depost 1950, sed estas uzata nur en iuj folkloraj festivaloj. La lingvo tre similas al la bretona de Francio. Kornvalo (Cornualles) estas duoninsulo en la sud-okcidenta parto de Britio.

Amador Díaz.

Bibliografio pri la menciitaj lingvoj:

Geiriadur Esperanto/kimra vortaro; J.C. Wells. 1985. Dudirekta vortaro.  
Konciza historio pri la kornvala lingvo kaj ĝia literaturo; G.H. Sutton. 1969. Kantoj, poemoj kaj satiro; Robert Burns, trad. de R. Rossetti kaj W. Auld. 1977.





## UNUECO ESTAS SUKCESO

---



La pasinta 50a Hispana Kongreso de Esperanto, restos en la memoro de la esperantistaro diversmaniere, ĉi estis treege altnivela; aliaj, tre amuza pro la muzikaj koncertoj; kelkaj, ĉefe estrararioj kaj delegitoj, tre efika; la kolektantoj, tre abunda, ĉar oni restis je la dispono de la kongresanoj; bildkartoj, insignoj, ŝlosiloj, k. la oficiala ŝtampo de la kongreso.

Tamen, ĉiuj opinias ke la 50a kongreso estis tre sukcesa. Kial? Ĉar por la kongreso, kunlaboris esperantistoj ne nur de la kongresurbo Sant Cugat, sed ankaŭ de Barcelono, Sabadell kaj Terrassa, kaj tiu unueca kunlaborado ebligis la sukcesan feston.

Nostalgia esperantisto, komentis al ni ke, malgraŭ la sukcesoj en la nunaj kongresoj, oni ne atingas la grandhombrian ĉeestadon kiel antaŭe, ekzemple: en la jaro 1963 aliĝis al la 24a Hispana Kongreso de Esperanto en Barcelono, 600 personoj, aŭ, en la jaro 1970, aliĝis al la 12a Barcelona-Provinca Esperantista Renkontiĝo en Manlleŭ pli da 300 personoj. Kompreneble la menciitaj eventoj estas ĉiuj atingis la plej altan ciferon, sed montras ke lastatempe, parton de la esperantistaro ne aliĝas al la landaj kongresoj.

Laŭ opinio de la subskribinto, tio okazas, ĉar nuntempe la esperantistaro, partoprenas amase en la eksterlandaj kaj internaciaj kongresoj. Eble, por aliri denove tiujn esperantistojn al la landaj kongresoj, la organizantoj devus plani la programon pli internacie.

Salvador Aragaj,



## MUZIK PAĜOJ

---

Dum nia hef-kongreso en Sant Cugat ni ĝuis pro la koncerto (inter aliaj) de muzikisto el Malago. Li estas "Solo", moderna komponisto kaj kantisto en esperanto. Li regalis nin per bela kaj originala spektaklo.

Li surbendis sondiskon nomata "kosmo-infano", ĝi estas sintesita komponaĵo sub influo de rokmuziko kaj nuntempa klasikmuziko. Sed speciale "Solo" posedas personan kaj esperantan stilon.

Li nun estas pretiganta venontan sondiskon kiu promesas esti eĉ pli bona ol lia unua laboro.


Se vi interesas pri tiu muziko ne pensu due. Petu al ni la sondiskon "kosmo-infano". Vi aĉetos bonan muzikaĵon kaj apogos la disvolvado de muziko en esperanto.

La prezo estas 1.000 pts.  
+ 250 pts. (sendkosto)

Pagmaniero: Sendu 1250 pesetan ĉekon, al la "Caixa de Terrassa" konto-numero 1955995 oficejo 6, nome de GRUP D'ESPERANTO JOZEFO ANGLÈS 08190 - SANT CUGAT V. Bonyolu skribi klare vian nomon kaj adreson.

NE PENSU DUE. VI NE PENTOS HAVI TIAN MAJSTRAĴON.

ADAMO.



## INTERVJUO



(D): Kia estas via aĝo, samideano Salvador Guma? Por ni, la novaj geesperantistoj de la lastaj jardekoj en Katalunio, via vivo kiel esperantisto estas tre grava.

(R): Mi estas preskaŭ sur la sojlo de mia 89-a jaro, ĉar (espereble) mi atingos ĝin en la proksima septembro. Kvankam laŭdire "aĝo tro matura ne estas plezura" mi konsideras ĝin la saldo de mia vivadkonto. Mi ne bedaŭras ke mi estis ĉiam fidela kaj aktiva konfesanto de la zamenofa verko.

(D): Je kia aĝo kaj kie vi eklernis esperanton?

(R): Mi estis nur 16-jara, en la sidejo de "Paco kaj Amo" en Barcelono, Str. Asturias, 1; kie nun estas la metro-stacio Fontana; sed mi loĝis apud placo Medinaceli, preskaŭ rande de la haveno, kaj mi iris piede al la kurso trifoje ĉiu semajno. Ŝajnas nekredeble ke mi trakuris tiun longan distancon en nur tridek minutoj!

(D): Ĉu vi gvidis multajn kursojn de Esperanto?

(R): Kursojn mi faris en Barcelono, en Parizo, en franca vilaĝo, en mia naskiĝloko Alcover kaj en Reus. Krome mi helpis koresponde al kelkaj samideanoj plibonigi la lingvoscion.

(D): Ĉu vi ĉeestis multe da esperantaj kongresoj? Ĉu esperanto estis tre utila al vi dum viaj vojaĝoj?

(R): Tri universalajn, kvar internaciajn konferencojn, tri kongresojn de SAT (Vieno, Liono, Valencio) kaj almenaŭ dekdu hispanajn kongresojn. Miaj translokigoj estis ĉiam ligitaj al esperanto, kaj nur per ĝi mi povis emigri Parizon en 1923, kie estante unu el la unuaj membroj de SAT mi kunlaboris kun ĝiaj fondintoj.

(D): Ĉu vi, kiel esperantisto povas primemori iujn anekdotojn?

(R): Vespere de mia unua tago en Parizo mi renkontiĝis en la sidejo de la Laborista Grupo kun semideano proksimume sarnaĝa kiel mi. Li parolis flue sed mi ne sciis konjekti lian nacianecon. Evidente laŭ la prononco li ne estis franca, nek angla, nek germana, nek eslava, nek itala ... mi riskis demandi: el kiu lando?

## INTERVJUO (II)

---

- El nenie! Li respondis; kaj aldiris: "mi estas sennaciulo!" "Mia patrino veturis per vagonaro kaj mi naskiĝis en la vagono dum veturado sur la limo inter du landoj. Mi, do, naskiĝis en neniu lando". (Poste mi povis scii ke li estas hungaro ekzilita el Hungarujo).

(D): Mi persone tre ĝojis kiam mi vidis vin en la kongresejo; kia estas via persona opinio pri la 50a. Hispana Kongreso de Esperanto?

(R): Ke ĝi funkciis bone kiel bona horloĝo! Apud la maturuloj mi vidis junulojn vigle parolantajn en bona lingvo. Neniarn antaŭe la kongresoj okazis tiel oportune. Ĉio okazis kvazaŭ en propra hejmo, sen prokrastoj, sen perdo de utila tempo, meze de la nuna senideala socio. Via 50a. Kongreso estis nova dato de la Ganda Sonorilo, memoriginta al forgesantoj ke esperanto plu prosperas.

(D): Ĉu vi ankoraŭ aktivas por esperanto?

(R): Mia rolo es la Esperanto Movado neniarn estis tiu de propagandistoj. Mi laboris iel trans la kurteno. Jam tridek jarojn mi revizias nian "Boletin", ankaŭ "Horizonton" dum ĝi aperis en nia lando. Krome mi reviziis verkojn, faris multajn recenzojn, verkis aŭ tradukis por "Boletin", "Horizonton" kaj "La Gazeto", konkursis literature (eĉ venkis: UEA, OOMOTO, Hispana Federacio, Gradara). Al mi ĉiam mankis tempo. Ankoraŭ nun mi estas membro de la juĝkomisiono de la konkursoj de "Fundacio Esperanto", kaj de tiu de la Floraj Ludoj. Ĝis nun mankas jaroj.

(D): Kion vi opinias pri la esperanta movado en Katalunio?

(R): Nia enlanda milito detruis nian movadon kaj ĝi ne plene refariĝis. Novaj homoj ne aperas en la daŭro de palpebrumo; tamen, iom post iom, novaj grupoj aperas kaj firme starigas. La Floraj Ludoj prosperas internacie. La ideo ne mortas. Komence de la jaro mi prelegis pri Esperanto ĉe Asocio de Virinoj en Reŭs, kaj la granda salono tute pleniĝis. Post la nokto levigas brila Suno; post profunda dormado impetas revekiĝo.

Kara Sarnideano Salvadoro, mi ne volas pli laciĝi vin, kaj tre dankas al vi tiun ĉi intervjuon ĉar ni bezonas kunlaboron.

Trini.



## DEMANDOJ

---

Ĉu Esperanto aŭ esperanto?

Ĉu interna ideo aŭ simpla kultura ilo?

Kiom da esperantistoj konscias ja pri la lingva problemo, aŭ tute simple, amas E-on, fuĝante iun ajn racionalan pozicion? (kaj tio gravas! ?).

Kaj kiom el ili estas pretaj/kuraĝaj forlasi esperanton se iu pravas pli efektiva alian vojon por atingi universalan komprenon ?.

Ĉu la esperantistoj rajtas pensi tute diverse, t.e., ĉu placus al vi ke radikaj politikistoj uzu/utiligu E-on? Aŭ eĉ teroristoj ...? Aŭ radikaj religiuloj? Kaj sciencistoj? Kiu estas la kvalita diferenco inter iuj kaj la aliaj?


Devas apogi la demokration, aŭ iun ajn politikan ideon, la esperantistoj? Kia! Ĉu ne estas pli bona la unuiĝo tute sendepende de politikaj ideoj? Kiu estas la diferencoj inter esperantismo kaj ekologismo? Kia devas esti la identeco de la esperantistaro, aŭ ĉu devas ekzisti tiu identeco?

Tiajn aferojn, mi klopodos pritrakti en venontaj numeroj de H.H. Mi ne volas formigi, sed nur informi, dialogi kaj dialogigi, pensi kaj pripensi je laŭta voĉo.

Kio estas certa, estas manko da dialogo, da intersanĝo de opinioj pri profundaj aferoj; kaj estas nur tiu dialogo kiu evitas perdon da tempo. "La mondo havas jam sufiĉajn problemojn por ke la homoj amuziĝu pri malcentraj kaj ne transcendantaj aferoj" !

Jose' Manuel' C.

Se vi volas opinii pri tiaj aferoj, bonvolu skribi al H.H., pk 336, 08190-S.Cugat.



## OMAĜO AL S-RO PETRO NUEZ

Unue mi dankas tutkore al la LOKA KONGRESA KOMITATO, precipe la prezidantino S-ino Trinidad García por la omaĝo al mia kara Petro.

Mi multe bedaŭris sed pro danĝera malsano mi ne povis ĉeesti en tiu ĉi evento, sed anstataŭis min nia kara Anĝela. Tamen, estu vi certa ke mia spirito kaj koro estis tie kun vi.

Mi dankas al miaj karaj amikoj (el Madrido, Bilbao, Valladolid, k.t.p.) kiujn telefone aŭ letere interesigis pri mi.

Maria Garcés

Southampton, 90 07 22

Kara samideanino:

Mi volas esprimi al vi kaj al la organiza komitato de la 50-a Jubilea Hispana Kongreso dankojn pro la plezuro kaj amikeco kiujn mi trovis dum la Kongreso en la Centro Borja. La programo estis interesa kaj la aranĝoj tre bonaj. La frukto de via, sendube longa, laboro kaj organizado donis al mi ne forgesblajn tagojn. Inter la pluraj eroj de la programo mi ĉiam memoras la mirindan kaj alkvalitan prelegon de Miguel Fernández pri García Lorca; mi sentas ke preskaŭ ĝi sola estus merito por ĉeesti kongreson.

Denove, dankon al ĉiu laboranto de la Komitato.

Elkore salutas, via,

*Amador Díaz*

Amador Díaz

"Bone, nun peceton en E-o, por iom praktiki kaj ankaŭ pro tio ke mi rilatos nun al esperantanĵ aferoj. La nuna estro de la ĉi tiea grupo, Francisko Dávila Dorta decidis ke la venonta kongreso okazos en Tenerife. La kialo estas ke D. Juan Régulo & D. Ramón Rodríguez Peña havos eble la lastan okazon por travivi kongreson, ĉar estas sciite ke en la jaro 1992 tiun kongreso okazos en Mérida. Ne estas mi kiu tion decidis, diras kaj volas. Mi ne povus kvankam se mi volus. Estas ili. Mi povas nur helpi!"

\$



# HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Centra oficejo / Oficina central:  
Rodríguez San Pedro, 13-3.ª, p.7. - E-28015-Madrid. - Tfno.: (9 1) 446 80 79

Bonvolu sendi la korespondajon pri tiu ĉi letero al jena adreso / Rogamos envíen la correspondencia relativa a este escrito a la siguiente dirección:  
ESPERANTO. - Apartado 714. - 15790-Santiago de Compostela

Urbo / Ciudad La Coruña Dato / Fecha 10.8.1992 Registro n-ro 597

S-ino Trinidad García Cobacho  
Preziantino de LKK  
Orient 59, 1ª, 3ª  
Sant Cugat del Vallès.

Kara amikino,

La estraro de HEF konstate konkludis en sia lasta kunsido en Sant Cugat del Vallès, ke la tiea kongreso estis sendube unu el la plej bone organizitaj kaj enhave gravaj ĝis nun okazintaj.


Pro tia kaŭzo, la estraro komisiis min, oficiale gratuli kaj danki en la nomo de la Federacio kaj de la estraro ĉiujn membrojn de la Loka Kongresa Komitato.

Estas por mi motivo de granda plezuro plenumi tiun komision pere de tiu ĉi letero; des pli, ĉar ĝi respegulas ankaŭ miajn personajn opiniojn kaj sentojn.

Mi petas vin ke, aldone al tiuj gratulo kaj danko, vi bonvolu akcepti ankaŭ miajn elkorajn kaj amikajn salutojn.



Samŝeane via,

  
Antonio Alonso Núñez  
Preziantino de HEF



## SPRITAĴOJ (I)

### **ĜUSTE**

Patro (al sia filo): Vi estas porkido! Ĉu vi scias kio estas porkido?  
Fileto: Jes, patro, mi scias. Ĝi estas la infano de porko.

(Salvador Gurnà)

### **AKTIVA KNABO**

- Patrino, ĉu vi permesas ke mi iru al la strato ludi kun la geknaboj - demandas Johano.
- Kara, vi scias ke al mi ne plaĉas ke vi estu amiko de la stratknaboj.
- Do, patrino, ĉu mi povas eniri por kvereli kun ili ?

### **MALFACILA AFERO**

Du drinkuloj revenas hejmen, kaj Petro diras:

- Amiko, mi petas ke niaj edzinoj ne prisciigu kie ni ĉeestis lastan nokton.
- Tre bone—respondas la amiko. Sed aŭskultu, kie ni estis ?



## **SPRITAĴOJ (II)**

---

### **ALDONITAĴO**

Sro. Frank iras al la civila nasko-registro por registri beb<sup>o</sup>n.

– Bonan matenon, sinjorino, mi volas registri la naski<sup>g</sup>on de mia filo.

La sinjorino plenumas la dokumentojn kaj Sro. Frank demandas kiom kostas ?

– Neniom, neniom, estas senpage.

Do, bonvolu enskribi ankaŭ la gemelon.

### **TRE MALAVARA VIRO**

Turisto voja<sup>g</sup>as tra Skotlando kaj perdas sian hundon. Li multe amis <sup>g</sup>in kaj iras al redaktejo kie li promesas kvanton da mono al tiu kiu trovos la hundon.

Post kelkaj tagoj la turisto reiras al la redaktejo kaj neniu trovi<sup>g</sup>as tie escepte la pordisto.

– Sro, <sup>g</sup>u vi estas tute sola ? Kie estas la direktoro ?

– Ho, <sup>g</sup>uj estas for, serc<sup>g</sup>ante vian hundon !

## LASTAJ NOVAĴOJ

---

Ĉi tiu bulteno estas la lasta informilo kiun vi ricevas kiel kongresano de la 50a. Hispana Kongreso de E-o. La LKK havas la esperon ke ĝi plaĉus al vi kaj restu en via memoro kaj koro kiel enricegaj spertaĵoj. Dankon pro via partopreno. Vi ja estis la veraj ĉefroluloj de la kongreso.

Ni disponas video-filmojn enhavintajn:

- La inaŭguroni.
- La ses-minutan raportaĵon de TVE en Katalunio.
- Intervjuon du-minutan al S-ro Alonso en TV3.
- Raportaĵon de "canal St. Cugat."

Tiuj kiuj volus havi ĝin, bonvolu skribi al ni: Grup d'Esperanto Jozefo Angles, konto numero 1955995, Oficejo 6, "Caixa de Terrassa", S.Cugat - 08190 (Bonvolu skribi klare vian nomon kaj adreson). La prezo estas 3.500 ptoj. (Dumkongrese, jam 4-5 personoj mendis tion al mi, sed, ĉar multaj aferoj miakape, tiuj nomoj, bedaŭrinde forlasis tute mian memoron! Se vi estas unu el ili, bonvolu mendi ĝin denove).

La pasintan 30an. de septembro okazis santkugate la lasta LKK-a kunveno prikongresa. La Prezidantino Trinitat Garcia kaj la sekretario Jose' Manuel' Conde dankis ĉiujn kunlaborantojn kaj laborantojn de la kongreso ĉar sen ilia helpo la kongreso ne povus okazi.

La sekretario reviziis la plej gravajn erarojn (laŭ sia vidpunkto) de la kongreso kun la unika celo lerni kaj superi ilin. Ankaŭe li promesis fari raporton kiam eble plej frue pri la organizado de la kongreso. Tiu raporto estus destinita esti vera gvidilo por ke estontaj LLK-oj sciu kiel agi por organizi kongreson kaj oni povu profiti la malpropran sperton.

Post legado de telegramo de S-ro Alonso, tuta la LKK kaj la kunlaborantoj de la kongreso tagmanĝis en restoracio amike kaj sukcese. Estis vere ĉarmaj momentoj por ĉiuj.

Ni profunde kondolencas la familion de unu el la fondintoj de la sankugata esperantistaro en la jaro 1929. Li nomiĝis Joan Puig i Plà kaj estis 87-jara. Forpasis la pasintan 15 de oktobro en Vilassà de Dalt.

Ni ankaŭ ampleksigas nian kondolencan al la familioj de la esperantistoj forpasitaj lastatempe en Barcelono-provinco. Ripozu pace ĉiuj ili.

\$



**50-a Jubilea Hispana**

de la 11-a ĝis la 16-a de Julio 1990



90 9 30

## LA ESPERO. L'himne de l'Esperanto

En la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko;  
per flugiloj de facila vento  
nun de loko FLUGU ĝi al loko.  
Ne al glavo sangon soifanta  
ĝi la homan tiras familion;  
al la mond' eterne militanta  
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero  
kolektiĝas pacaj batalantoj,  
kaj rapide kreskas la afero  
per laboro de la esperantoj.  
Forte staras muroj de miljaroj  
inter la popoloj dividitaj,  
sed dissaltos la obstinaj baroj  
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento  
komprenante unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.  
Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos,  
ĝis la bela sonĝo de l'homaro  
por eterna ben' efektiviĝos.

L.L. Zamenhof